

Bazaj principoj de justa lingvopolitiko kaj ilia realiĝo en scienca akademio

Helmar Frank

Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino

La Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino havis kiel antaŭhistorion Eŭropan Klubon. Kaj la lingvopolitiko de la Akademio sekvis el la diskutoj kiuj antaŭe okazis kadre de Eŭropa Klubo, kiun mi prezentu unue.

Eŭropa Klubo fondiĝis jam en la jaro 1974, kaj ĝia baza celo vortumiĝis jene: “Ni volas kontribui al la starigo de libera Eŭropo, de samrajtaj nacioj konservante ilian lingvan kaj kulturan heredaĵon.” (Nacio estas grupo kiu parolas la saman lingvon.) Post kvin jaroj, Eŭropa Klubo instigis la registaron de San-Marino fondi “Inovacian Liberan Universitaton” kiun oni finfine nomis Akademio Internacia de la Sciencoj. La fondodecido de la registaro de San-Marino okazis en la jaro 1983, kvankam nur antaŭ dek jaroj finiĝis la tuta jura proceduro. La Akademio aktivis komence nur en la respubliko San-Marino mem, poste transiris landlimojn kaj aktiviĝis unue en Pollando, poste ankaŭ en Rumanio, poste ĉi tie en Prago (Ĉeio), finfine ankaŭ en Slovakio, tute oficiale per aprobo flanke de la registaro. Estas aliaj landoj, inkluzive Rusion, kie okazas la unuaj paŝoj por ankaŭ tie ekaktiviĝi.

La lingvopolitiko

Eŭropa Klubo komencis per la celo kontribui iel al lingva samrajteco en la estinta Eŭropa Unio, siatempe la Eŭropa Komunumo. Oni celis esti tute lojala al la principo, kiu estas en la Romaj Traktatoj, ke ĉiuj oficialaj lingvoj de eŭropaj landoj kiuj apartenas al la Unio estu samrajtaj. Oni ankaŭ opiniis ke oni bezonas komunan neŭtralan lingvon. Kaj en la komenco, dum la fondomonatoj de Eŭropa Klubo, oni estis absolute ambigua: kiun neŭtralan lingvon ni prenu? Oficiale ja ekzistas tuta aro da planlingvoj, kaj neŭtrala ja ankaŭ estas la latina lingvo. Ni tuj vidis ke la aliaj planitaj lingvoj, krom la Internacia Lingvo de D-ro Esperanto, ne estis praktike utiligeblaj pro la manko de sufiĉa parolantaro, kaj mi mem konvinkiĝis kiam mi siatempe trastudis la diversajn gramatikojn ke tiu Internacia Lingvo de D-ro Esperanto plej plaĉis al mi kaj estis iu kompromiso inter racieco kaj natureco. Aliflanke, la latina lingvo havas prestiĝon, ludas rolon kaj ni ne volis ekskluzivigi ĝin. Do en la komenco, ni diris, ni prenu praktike la internacian lingvon, sed se la Eŭropa Parlamento decidus enkonduki la latinan, aŭ alian neŭtralan lingvon, kiel komunan eŭropan lingvon, ni cedos. Ni siatempe aperigis eŭropan kalendaron en kiu ni prezentis nian principon: ĉiun lingvon samrajtan, kaj kun iu reliefigo de la du neŭtralaj lingvoj kiuj estis iel konsidereblaj kiel komuna lingvo, nome la latina kaj la internacia lingvo. Fakte la latina lingvo ne ludis grandan rolon; preskaŭ ĉio okazis estis en la internacia lingvo.

Post la fondo de la Akademio, la graveco de Eŭropa Klubo iom falis, ĉiuj fortoj koncentriĝis al la Akademio, kaj nur pasintan jaron Eŭropa Klubo reaktiviĝis kaj ĵus reaperis la eŭropa kalendaro. Intertempe kreskis la nombro de la lingvoj – kaj antaŭ la ponto staras ankaŭ pluraj landoj kiuj volas aliĝi – kaj ni prezentis la diversajn landojn jam apartenantajn laŭ la jena principo: en la landa lingvo (aŭ lingvoj, ekz. en la kazo de Belgio), en la internacia lingvo kaj la latina, laŭ tiu sinsekvo en ĉiu unuopa kazo. Ni komencis diskuti iujn tem-postulojn pri lingvopolitiko. Ni trovis tri tre bazajn principojn – laŭ mi diskutendajn ankaŭ en aliaj rondoj.

- Unue, *neniun lingvodefetismon* ni aprobas. Kio estas lingvodefetismo? Nu, ĉiuj kiuj volas kredi nin ke estus tute vane kontraŭstari fremdan lingvoimperiismon, ke estus racie toleri iun lingvan aliĝon. Tio estas pensmaniero tipe germana; la germanoj diras “Ne plu havas sencon defendi la germanan lingvon; la angla lingvo estas la lingvo de la estonteco; ni devas

rezigni – en scienco, kaj iom post iom en ĉiuj sferoj – pri nia propra lingvo.” La francoj estas iom pli memfidaj, la italoj ankaŭ, sed la germanoj en tiu punkto estas absolute nekonvinkeblaj pri la kultura valoro de la propra lingvo. Tio laŭ mi estas lingvodefetismo. Ni volas konservadon de nia nacia identeco, ni volas flegadon kaj plievoluigadon de nia propra lingvo, kaj ni volas helpi savi la tuteŭropan riĉecon de naciaj lingvoj.

- Ni volas *neniun lingvoŝovinismon*, laŭ kiu oni opinias ke la propra lingvo pli altvaloras ol la aliaj.
- *Neniun lingvo-utopiismon*. Ni vidas du lingvo-utopiismojn: unue tiun, kiu estas la kutimo de la politikistoj, kiuj tutsimple opinias ke la rolo de iu preferenda komuna interkompreniĝlingvo en Eŭropo povus esti donata al iu nacia lingvo – ekzemple la franca – kaj ke tio absolute ne malutilus al la aliaj lingvoj. Iomete pli fajna utopiismo: oni diras “Ĉiu lernu laŭeble plej multajn lingvojn, kaj tiam ĉiuj lingvoj ja estas samrajtaj – ĉar oni ja povas lerni iun ajn lingvon.” Kontraste al tio, ni opinias ke oni devas havi konstruivajn ideojn, kaj unu tia ideo estas uzi en la propra influfero neŭtralan lingvon aŭ neŭtralajn lingvojn. Ne havas sencon atendi ĝis kiam Unesko eventuale tiom maturiĝos ke ĝi enkondukos la internacian lingvon: tie kie oni mem povas influi, oni jam uzu ĝin – ekzemple sur la propra leterpapero, en la propra universitato.

En AIS estas ekde la komenco du lingvoj preferataj laŭ la statuto, nome la landa lingvo de la lando San-Marino, do la itala, kaj la internacia lingvo. Komence oni volis aldoni ĉiujn oficialajn lingvojn de Unesko – sed estis iu eraro: oni kredis ke temas pri la angla kaj la franca, kaj kiam oni komencis traduki en la rusan kaj la ĉinan, en San-Marino oni iomete miris kaj eksciis ke ankaŭ tiuj lingvoj estas oficialaj ĉe Unesko. Dum la fondoakto oni forstrekis tion, kaj tute klare vortumis, sen referenci al Unesko, ke la oficialaj lingvoj estu la itala lingvo, la internacia lingvo, la franca kaj la angla. Sed la lastan horon, antaŭ la fina fondo, montriĝis ke ni ne povas esti iu internacia akademio se ni dependas de la ŝtato de San-Marino. Oni iel memstarigis nin, kio havis financon konsekvencon: ni devis pagi la notarion. La notario postulis 5000 markojn, proksimume. Surloke, nur germanoj havis en la poŝo sufiĉe da mono, kaj ni uzis la momenton por diri: “Jes, ni povas, kondiĉe ke la germana lingvo aldoniĝu.” Pro tio la germana lingvo nun same kiel la angla kaj la franca estas ne-landa lingvo samrajta en AIS. Vi vidas, ni ne estas ŝovinistoj: se ne estintus jam la angla kaj la franca ni neniam postulus la germanan lingvon – nur por havi la saman rajton. Intertempe montriĝis ke ĉefe estas uzata la internacia lingvo; la germana kaj la itala iel samrange; kaj sufiĉe malofte la franca kaj la angla.

Nia konduto ĉi tie en Prago

Nia principo estas ke la kursoj kiujn faras AIS estu en la internacia lingvo, la prelegoj estu aŭ en unu el la etnaj lingvoj, aŭ en la Internacia, aŭ en la loke oficiala lingvo. Kaj nun estas speciala problemo, la pragmatika problemo: ni eksperimentos ĉi-foje je la fino de nia studadsesio dum speciala dutaga simpozio pri iu solvo pragmatika pri kiu ni povos diskuti. Ni inventis iun minimuman lingvan moralon kiu tekstas jene: ni ne akceptu la vortojn “internacia kongreso”, “internacia simpozio”, “internacia konferenco”, por okazaĵo en kiu ne estas plenumitaj la jenaj du bazaj principoj:

- Unue, ne estu donita pli alta formala rango al fremda nacilingvo ol al la loka oficiala lingvo;
- Due, se la kunveno estas plurlingva, tiam neŭtrala lingvo devas esti minimume samrange uzebla kiel ĉiuj ne-loke oficialaj lingvoj.

Do, se oni aplikas tiujn principojn al tiu ĉi simpozio, ĝi ne estas internacia ĉar oni uzas la anglan kaj la francan, kaj donas al ili pli altan rangon ol al la ĉea, kiu ne estas uzata. Ni uzos dum tiu nia simpozio la “ĉean kaj slovakon”; ni uzos la germanan lingvon, ĉar la fako havas multan literaturon en la germana; kaj ni uzos la internacian lingvon. Sed ni rezignas pri tradukado. La prelegoj estos faritaj en unu el tiuj tri lingvoj, kaj estas en la programkajero la resumo – cetere

informhava resumo – en la du aliaj lingvoj. La ideo estas ke kiam oni ne povas aŭskulti la prelegon ĉar oni ne komprenas la lingvon, oni povas almenaŭ studi la enhavon kaj legi ĝin kvinfoje, kaj tiam en la cerbo restos la sama kiel se oni estus aŭskultinta la retorikaĵojn de la preleganto.